



Norvega Esperantisto

ESP E R A N T O B L A D E T

N-ro 3
1965

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
31-a (37-a) jaro
Monata

La subskribkolektado

Regule alvenadas al la oficejo de N.E.L. folioj kun subskriboj de la peticio al U.N.O.; kelkaj folioj estas tute plenaj, kelkaj estas duone plenaj, kaj kelkaj portas nur unu-du subskribojn. Tio estas tute en ordo. Sed la folioj ne alvenadas tiel amase, kiel ni esperis. Tio ne estas tute en ordo.

Tio ĉi estas tasko, al kiu ĉiu membro facile povas kontribui. Estas ja treege grave ke U.E.A. povos transdoni al U.N.O. peticion kun vere impona amaso da subskriboj, nur tiel la peticio havos efikon al la gvidantoj de la mordorganizaĵo. Ni tial sincere petas ĉiujn, absolute ĉiujn membrojn aktive partopreni en tiu ĉi agado. Pliajn foliojn vi povos kiam ajn ricevi de la oficejo de N.E.L.

Kelkaj membroj skribis al ni, demandante pri detaloj. Estas do utile tie ĉi doni la respondojn al la detaloj, pri kiuj oni demandas.


Kompreneble ankaŭ la esperantistoj mem subskribu la peticion. Ne sufiĉas ke via nomo aperas malsupre sur la dorsflanko, kiel kolektinto. Vi subskribu ankaŭ sur la antaŭflanko de la unua folio, kiun vi ensendos.

Kiam vi petas homon subskribi, li subskribu en la *dekstra* kolono. Poste vi mem povos plenigi la aliajn rubrikojn: en la maldekstran vi skribu lian nomon legeble (per presliteroj aŭ skribmaŝino), en la duan vi skribu lian profesion en norvega aŭ Esperanta lingvo laŭdezire, kaj fine la lokon kaj la adreson.

Estas tre grave kolekti ankaŭ kolektivajn subskribojn, sed bonvolu kolekti tiajn sur aparta folio, kie ne aperas ankaŭ subskriboj de unuopaj personoj. Vi povas simple peti la prezidanton aŭ la sekretarion de iu organizaĵo subskribi en la nomo de la tuta organizaĵo. Ankaŭ tiukaze la subskribo kaj la nomo aŭ la stampo de la organizaĵo aperu en la *dekstra* rubriko. Kelkfoje la prezidanto aŭ sekretario volas demandi sian estraron. Tial estas bone se vi havas multajn foliojn, kaj povas lasi unu folion nur por lia organizaĵo. En la maldekstra rubriko vi povos skribi Esperantan tradukon de la nomo de la organizaĵo. Se vi havas aliajn demandojn, ne hezitu skribi al N.E.L., kiu volonte klarigos ĉion.

(daŭr. p. 36)

Nordlanda Esperanto-Kongreso



en Oslo
19/6-22/6
1965

INFORMILO 4

1. Oslo — la kongresa urbo — situas kvazaŭ en ĉevalfero el arbarkovritaj altaĵoj, malferma al la fjordo. La ĉirkaŭaĵo de Oslo prezentas belegan ekskursan terenon, kies egalon oni trovas preskaŭ nenie en la mondo. — Por ke la kongresanoj povu utiligi la eblecon ekkoni la mondfamajn vidindaĵojn de la norvega ĉefurbo la Loka Kongresa Komitato disponigos unu kaj duonan tagon por lokaj ekskursoj jene:

a) Sabaton 19/6 posttagmeze: En-urba ekskurso vizitante Urbodomon en Oslo riĉe ornamitan de norvegaj artistoj kaj kun la plej granda monumenta pentraĵo de la mondo. Poste per aŭtobuso al la mondfama Skulptaĵa Parko de Vigeland en Frogner kiu ampleksas 150 grupojn da skulptaĵoj kaj post tio la aŭtobuso transportos nin al la ĵus inaŭgurita moderna konstruaĵo Munch-Muzeo kun abundo da pentraĵoj de la granda norvega majstro Edvard Munch.

b) Lundon 21/6 tuttaga ekskurso per aŭtobuso en la ĉirkaŭaĵo de Oslo kaj reen per boato sur la bela Oslofjordo; Ni vizitas la Skisportan Centron de la mondo *Holmenkollen*, la Vikingajn ŝipojn, la KON-TIKI-Muzeo kun la floro de Thor Heyerdahl, la polusesploran ŝipon *Fram* de la mondkonata esploristo Roald Amundsen, kaj ni manĝos lunĉon

en liberaera restoracio en la popol-kultura parko en Bygdøy kie ankaŭ aranĝigos speciala diservo por la esperantistoj en la unika fostopreĝejo de Gol el la 12-a jarcento.

2. La postkongresaj ekskursoj — pri kiuj ni detale informos vin en venonta kongresa informilo 5 — nepre estos neforgesebla travivaĵo por la partoprenantoj. Oni povos elekti inter ekskursoj al la Okcidentaj Fjordo, al la Altmontaro aŭ al la Suda Marbordo. La prezoj presitaj dorsoflanke sur la aliĝiloj validas ankaŭ por la reveturo al Oslo.

3. Ekspozicio pri Esperanto okazos dum la kongresa tempo en centro de la urbo ĉe la enirejo de la plej granda kinejo de Oslo sub la devizo: ESPERANTO — la vojo al internacia kompreno.

4. Kongresbroŝuro 8-paĝa donos superrigardon al la unuopaj kongresaranĝoj kun hortabelo, kartoj pri Oslo kaj pri la kunvenejoj, utilaj sciigojn pri restoracioj, trinkmono, valuto k.t.p.

LA LOKA KONGRESA KOMITATO
John Berggreen

5-kronulado al la Informfondaĵo de N.E.L.

Listo 6:

Chr. Hanson, Skudeneshavn
Didrik Mjøllhus, Skudeneshavn
O. M. Wikre, Skudeneshavn (10,-)
Johs. Mjøllhus, Kopervik
Björg Torkelsen, Skudeneshavn
O. Sandslett, Skudeneshavn
Carl G. Eriksen, Trondheim
Kal M. Tombre, Drammen
Gerd Teigland, Sauda

Entute 9 pagintoj.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo
Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—
1/8 p. kr. 19,—.

La Kongreso en Oslo

La Loka Kongresa Komitato de la Nordlanda Esperanto-Kongreso regule informas nin pri programoj ktp. Aliĝiloj estas amase senditaj al la kluboj, kaj pliajn oni povos ricevi. La LKK modele laboras.

Ĉar la UK estos tiel malproksime ĉijare, nur malmultaj el ni havos la okazon partopreni tie. Nun la bonŝanco tamen favoris nin: en la norvega ĉefurbo, kvazaŭ en la geografia centro de Skandinavio, okazos kongreso jam en junio. Kaj la haloj de la Universitato nin gastigos. Ni renkontos esperantistojn el ĉiuj Nordaj landoj, kaj anoncis sin partoprenantoj ankaŭ de aliaj landoj, tiel ke ni jam havos la senton de internacia kunestado.

Al la modela laboranta LKK ni faciligu la laboron per frua sinanoncado, kaj ni amase iru al Oslo en la plej bela sezono da la jaro!

Esperanto en Afriko

Antaŭ kelka tempo UEA demandis al la iom malnovaj kaj solidaj landaj Esperanto-asocioj, ĉu ili estus pretaj subteni kaj helpi la novajn landajn asociojn, kiuj iom post iom fondiĝadas en la novaj lando jen Afriko kaj

Azio, kaj NEL tuj anoncis sin por helpi al du afrikaj asocioj, nome tiuj en Madagaskaro kaj en Mocambiko.

Estas ja tiel ke kiam fondiĝas Esperanto-asocio en nova lando, kie Esperanto ĝis tiam estis pli-malpli nekonata, la gvidantoj de la nova asocio estas tute senspertaj pri laboro por Esperanto, kaj tro ofte ni vidis ke tia asocio ne havis longan vivon.

Ĝis nun ni ne sukcesis ekhavi kontakton kun la asocio en Mocambiko, sed kun la Madagaskara asocio ni jam havas bonan kontakton ĉar oni tie deziras laŭeble baldaŭ starigi Esperanto-ekzamenojn, ni i.a. sendis al ili en traduko la tutan ekzamenan regularon de NEL, kaj estas planoj ankaŭ pri aliaj helpagadoj de nia flanko.

Povas esti ankaŭ ke lokaj kluboj en tiuj landoj deziras kontakton kun lokaj kluboj en nia lando. Kredeble ankaŭ estos aktuale kolekti inter niaj membroj abonantojn de iliaj Esperanto-gazetoj.

Sed pri tio ni revenos poste. Tio ĉi estas nur informo al niaj membroj ke NEL jam partoprenas en tia help-laboro.

C. Støp-Bowitz.

Sciigoj de N.E.L.

Taskotabelo por la kluboj. —
Aprilo: Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 1-a jar-kvarono (blankedo A 10) al NEL kaj kopion al la distrikto. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas al NEL kaj al la distrikto kotizojn kaj liston pri la malfruiĝintaj kaj eventualaj novaj membroj.

La Estraro.

Kjell Offerdal 50-jara

La 26-an de marto nia kara kaj konata samideano Kjell Offerdal estis 50-jara. Li esperantistigis jam kiel tre juna, kaj estas unu el la fondintoj de la Esperantoklubo de Bergen.

Dum ĉiuj jaroj li fidele kaj fervore partoprenis en la laboro por nia movado kaj havis ĉiujn postenojn de konfido en la estraro de la klubo de Bergen, nuntempe li estas sekretario.

Li faris sennombrajn paroladojn por Esperanto, gvidis multajn Esperantokursojn kaj studrondojn, verkis kaj tradukis, inter alie, grandan nombron de Esperanto-poezio. — Li enkondukigis en la Turistgvidantan Ekzamenon ankaŭ Esperanton kiel fakon, kaj trapasis mem tiun ekzamenon. Li ankaŭ estas membro de la Ekzamena Komisiono de NEL en Bergen.

Kjell Offerdal estas Kavaliro 2 de PRO MERITO, kaj li ankaŭ havas la diplomon kaj ordenaĵon de Pro Fidelo de la Esperantoklubo de Bergen.

Ni kore gratulas kaj bondeziras!

Samideanoj.

HELSINGØR

La 18.—25. de julio okazos la internaciaj feriaj Esperanto-kursoj (perfektiga - konversacia - kaj prepara kurso por naturmetodaj instruantoj) en La internacia Altlernejo en Helsingør (Danlando), belega loko kun parko kaj ĉe banstrando. Ĉiuj kore bonvenaj. Senpaga prospekto havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9

Åbyhøj, Danlando

La subskribkolektado

(daŭr. de p. 33)

Sed plej grave estas ke vi kolektu, fervore kaj amase. Ofte la esperantistoj demandas sin: Kion mi povas fari por la movado? Jen la respondo. En tiu ĉi kampanjo ĉiu povas fari gravegan kontribuon al la venko de Esperanto!

C. Støp-Bowitz.

Solvo de la krucvortenigmo

Horizontale:

1. Aeroplano 8. Impresa 15. Unika 16. Okinavo 18. Eroj 20. Ltors 21. FV 22. Luk 23. Ebl 24. Du 25. Opereto 28. Blovu 31. Lo 32. Zo 34. Okulisto 36. Kalk 38. Bizerte 39. Informoj 41. Eao 42. Trotuara 45. Moka 46. LSN 47. Oacin 48. Ogivo 50. Iri 52. Am 54. Mueli 56. Rdon 57. Ekzisto 60. Ka 61. Aĉeto 63. Amo 64. Ep 65. Nosnep 67. Du 68. Unisono 71. Tokr 72. Pi 74. Ol 75. Ilin 76. Ro 77. Fajfilego 80. Bo 81. Tri 83. Alarmo 84. Nj 85. Acidega 86. Azio

Vertikale:

1. Auld 2. Entuziasmuloj 3. Rio 4. Okro 5. Pasporto 6. Novel 7. OK 8. In 9. Malbonagi 10. Pvu 11. Rokoko 12. Se 13. Are 14. Ajloj 17. Iros 19. Obl. 21. Frueoc 26. Ektransporti 27. Ti 29. Varmo 30. Ulmo 33. Ozon 35. Tiroloj 37. Kokido 38. Bela 40. Jaro 43. Timono 44. Unu 49. Voĉ 51. Insularo 53. Iz 55. Ekstaza 56. RT 58. Koni 59. Jes 61. April 62. Esper 66. Ekfal 67. Do 69. Inta 70. Nord 73. Igma 75. Ibn 78. Lau 79. Ooz 82. Ie

Korespondu!

Fraŭlo, 26-jara, deziras koresp. kaj interŝ. bildkartojn. S-ro Han Nicolae, Str. 7 Noembrie 6, BAIA-MARE, Rumanujo.

50-a Universala Kongreso de Esperanto

Tokio 31/7 — 7/8 1964

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata,
Prezidanto de la Japana Akademio

TEATRA PREZENTADO

Du la Universala Kongreso okazos teatra prezentado fare de la «Teatro Populara» el Lodz (Pollando). Prezentaĵo estas la konata dramo de la usona verkisto Shimon Vincenberg «Kataki signifas malamikon».

FOTO-KONKURSO

Ni atentigas la interesigantojn ke la juĝkomisiono akceptos konkursaĵojn ĝis la 1-a de julio 1965. Por eviti altajn kostojn pro aerpoŝta sendo, estas konsilinde sendi la fotojn por la Konkurso per surfaca poŝto, kalkulante ke en tiu kazo necesas 40 ĝis 60 tagoj.

Ni samtempe memorigas pri la riĉaj premioj je dispono de la gajnintoj, kiuj konsistas el 210,- ned.gld. plus 1 foto-aparato kaj 3 projekciiloj por lumbildoj. La foto-aparato kaj la projekciilo estas afable disponigitaj de la konata japana fabriko FUJI.

Detaloj pri la Konkurso troviĝas en la Dua Bulteno kaj en la novembro eldono (1964) de la revuo «Esperanto».

KOTIZOJ

Post la 31-a de marto la aliĝkotizoj estas la jenaj:

Kongresano	60,— ned.gld. (240 st.)
Edz(in)o	30,— ned.gld. (120 st.)
Junulo ĝis 20 jaroj	23,— ned.gld. (92 st.)
Universitata Studento ĝis 30 jaroj	37,— ned.gld. (148 st.)
Blindulo	30,— ned.gld. (120 st.)

POSTKONGRESO

La partoprenantoj havos la okazon viziti i. a. fabrikon por elektro-aparatoj kaj viskio-fabrikon.

STATISTIKO

(ĝis 10/2 1965): Alĝ. 1, Argentino 4, Aŭstral. 23, Aŭstrujo 8, Bah. Ins. 2, Belg. 7, Braz. 9, Brit. 42, Bulg. 11, C.A.R. 1, Ĉeĥ. 1, Danlando 16, Finn. 6, Franc. 82, Germ. 40, Hind. 1, Hisp. 7, Hong-Kong 2, Hung. 6, Islando 1, Isr. 2, Ital. 29, Japan. 714, Jugosl. 10, Kameruno 2, Kanado 4, Maroko 2, Meksikio 2, Monako 2, Nederlando 32, Norvegujo 11, Nov-Zel. 12, Poll. 25, Portug. 1, Rumanujo 1, Sovetunio 1, Sved. 47, Svislando 12, Urugvajo 4, U.A.R. 1, Usono 45, Venezuelo 3.

Entute 1232 el 42 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

Sub la Signo de la verda Stelo,

unu el la plej novaj Esperanto-libroj, enhavas rakontojn de 19 diverslandaj samideanoj pri interesaj el ilia vivo kiel Esperantistoj. Pro ĝia sukceso la eldonejo decidis aperigi duan volumon (kun alia titolo) kaj petas materialon de ĉiu, kiu spertis ion interesan per Esperanto. Ĉiu rakonto ne superu 1500 vortojn. — Bonvolu sendi vian rakonton antaŭ 1/6 al

DANA ESPERANTO-ELDONEJO
Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando

Amatora botanikisto

kiu havas intereson por korespondado pri botanika diskutado kaj interŝanĝo de premitaj floroj kun dana amatora botanikisto. Skribu al instruisto

E. SKJERNINGE

Sandbechs allé 2

Hvalsø, Danlando

21-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO

8.—15. de aŭgusto 1965
Sub la aŭspicioj de Gubernio Siga kaj Urbo Ootu

ĈU VI JAM ALIGIS AL NIA 21-a ?

Se ne, tuj aliĝu ! Unu-folia bulteno kaj aliĝilo por la 21-a IJK estas jam kvante senditaj al ĉiu landa sekcio de TEJO. La interesatoj tuj petu de via landa sekcio havigi al vi ilin. La junuloj aliĝintaj al la 50-a UK en Tokio nepre kaj tuj plenu la aliĝilon por la 21-a IJK aldonitan en la Dua Bulteno de la 50-a, kaj sendu al la Korespondadreso de la 21-a.

Programeroj: Interesaj programeroj por la 21-a IJK estas nun starigitaj. Plenplenas jen studo, jen distro, jen japanesko !

La dimanĉon, 8. aŭg. — matene, karavana veturado de Tokio al Kioto per luksa «ultra»-ekspresa trajno. Interkona vespero dum kongresa balo.

La lundon, 9. aŭg. Oficialan Inaŭguron sekvos la oficiala akcepto de la guberniestraro de Siga kaj urbestro de Ootu. Posttagmeze, libera promenado en la urbo Ootu kaj sur la lago Biwa.

La mardon, 10. aŭg. — tut-taga ekskurso al la urbo Kioto kaj la monto Hiei. (komuna aranĝo kun la Postkongreso de la 50-a UK)

La merkredon, 11. aŭg., tage, prelego oratora konkurso kaj ĝenerala kunveno de TEJO. Belarta vespero, en kiu prezentiĝos ensemblo de la japana muziko, esperanto-lingva teatraĵo de «Trupo Nubo», kaj diversnacia demonstracio de dancoj, kantoj, folklorajoj, k. s. far de partoprenantoj.

La ĵaŭdon, 12. aŭg., tuttaga ekskurso al la urbo Nara kun la vizito al viski-fabriko kaj televid-fabriko. (komuna kun la Postkongreso.)

La vendredon, 13. aŭg., matene, prelego kaj diskutado. - Posttagmeze, konkursoj de japana belskribo (kalligrafio) kaj paperfaldado (kun afabla gvidado por nespertuloj). — Gaja vespero en la renkonto kun loka junularo (sub la aranĝo de Junulara Ĉambro de Komerco en Ootu).

La sabaton, 14. aŭg., matene, prelego kaj diskutado. Posttagmeze, sporta kunveno kaj elekto de «Miss kaj Mister Esperanto». Interŝanĝo de donacoj kunportitaj de la partoprenantoj. Kampadeja distrado ĉirkaŭ la fajrejo.

La dimanĉon, 15. aŭg. Ferma Soleno. Karavana veturado de Kioto al Tokio. (Partoprenantoj povos libere naĝi aŭ bani sin en la proksima naĝejo dum la ripozaj kaj vakuaj horoj inter la programeroj.)

Ne forgesu, partoprenantoj, kunporti: naĝkostumon, popolkostumon, donacaĵon kun mesaĝeto, muzikinstrumenton kaj taŭgan materialon por la internacia belarta vespero, kaj vian pasporton kun valida enirvizo en Japanujo (mem vizitu por tio ĉi la japanan konsulejon).

Decidu, do, vian aliĝon al la 21-a Internacia Junulara Kongreso en Japanujo, unika renkontiĝo por gejunuloj-esperantistoj!

Atenton pri la altigo de la aliĝkoto: ĝis 1. aprilo 1965:

63 ned.gld. por junuloj malpli ol 20
70 ned.gld. por junuloj pli ol 20

(Validas la dato de la poŝtofeja stampo.)

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

JARKUNVENOJ

La Esperantoklubo de Bergen

jarkunvenis la 28/1 sub gvido de Kristian Sivertsen. — La sekretario legis la jarraporton, kaj la kasisto la jarbilancon. Post kelkaj rimarkoj ambaŭ estis aprobitaj.

La elektoj de la novaj estraranoj donis jenajn rezultojn: prezid. Elsa Njøten; vicprez. Johs. Jahren; sekr. Kjell Offerdal; kasistino Nelly Bjørge Nilsen; estrarano Jenny Jahren. Al la ceteraj kluboficoj ĉiuj estis reelektitaj.

Kelkaj proponitaj legŝanĝoj estis unuanime akceptitaj.

La plej fidelaj membroj ĉeestis la la jarkunvenon, kaj bona atmosfero regis.

La Esperantoklubo en Sauda

jarkunvenis la 15/1. Ĉeestis 6 anoj. Alvenis letero de la Okcidenta Distrikto pri komuna kunveno, kaj ni proponis Hogganvik kiel konvenan lokon. — La estraro estis reelektata, escepte de la prezidanto, kiu funkciis 2 jarojn, kaj havas tro da laboro. Nova prez. elektiĝis Olav Andersen.

La Esperantoklubo en Kristiansand

okazigis jarkunvenon la 28/1. Ĉeestis 13 membroj kaj 3 gastoj. La prez. s.ino B. Vik malfermis la kunvenon. La sekretario s.ro H. Grøntoft legis la jarraporton kiu estis aprobita. La kasisto s.ino B. Hveem legis la kasbilancon, kiu ankaŭ estis aprobita.

La elektoj donis jenajn rezultojn: prezidanto Birger Reinertsen; vicprez. Jakob Lønne; estrarano Ellen Lønne; anst.-anto Johan Westerlund. La aliaj estraranoj, t.e. la sekretario kaj la kasisto estis reelektitaj. — La

nova prezidanto dankis pro la fido kaj ankaŭ dankis al la eksprezidanto. Tiu ĉi dankis pro la kunlaboro dum la pasinta jaro.

Post la kafo B. Vik legis amuzan numeron de Nova Stelo, la manskribita klubgazeto. Reinertsen regalis nin per pianludo.

ORDINARAJ KUNVENOJ

Klubo Esperantista en Oslo.

18/1. La prez. John Berggreen malfermis la kunvenon dezirante al ĉiuj bonan novan jaron. Tiu ĉi jaro estas tre grava jaro — estas la Jaro de Internacia Kunlaboro; estas la jaro de la granda subskribkolekto al pet-skribo al UNO; en Oslo okazos la Norlanda Esperanto-Kongreso kun la landa kunveno de NEL. Tio signifas multajn labortaskojn kaj li petis la klubanjon kunhelpi ĉar ilia asisto estas ege bezonata.

La Kluba Kantgrupo kantis «Bonan novan jaron». — La prez. referencis al la 2 proponoj menciitaj en la lasta Kluba Bulteno: Pri la ŝipekskurso al Århus kaj eventuala elekto de Esperanto-klubo en Budapeŝto kiel amikec-klubo de Oslo.

R. Bugge-Paulsen informis ke li ricevis kiel donacon — kun sinceraj salutoj de la finna ambasadorino, T. Leivvo-Larsson — la esperantan tradukon, ilustritan, de la finna nacia eposo «KALEVALA», kaj li transdonis la libron al la klubo.

En la serio «Mia alia intereso krom Esperanto» K. Norvall faris babilajon pri kolorfotografado. Li montris al ni multajn belajn kolorlumbildojn de Norvegujo en vintra kostumo. Li rakontis ke dum 8—10 jaroj li eksperimentis pri vintraj bildoj, kaj li deziras montri al ni la rezultojn. Li diris ke li ne volas instrui nin, sed ke la bildoj mem donas ideojn. La atenta aŭskultanto kaj rigardanto ri-

cevis multajn utilajn informojn por eskuri bonajn bildojn. La prelego bonege prezentita rikoltis fortan kaj merititan aplaŭdon.

Dum la «10-minuta lingva instruado» John Berggreen instruis nin pri kelkaj el la relative malofte uzataj afiksoj (bo, pra, fi, aĉ, ing, uj, um, op, ebl, ind) kaj la skribmaniero de duoblaj vortoj.

Dum kaj post la kafopaŭzo oni diskutis la proponon pri ŝipekskurso al Århus. Ŝajnis esti populara ideo. La klubanoj elektis la tagojn 8/5—10/5 kiel ekskurstagojn kaj anoncis sin tuj 16 partoprenontoj.

La diskuto pri eventuala elekto de Esperantoklubo en Budapeŝto kiel amikecklubo de Oslo estis prokrastata al venonta klubkunveno, kaj la prez. admonis la membrojn serioze konsideri la demandon.

4/2. La ĉefpunkto de la programo estis prelego de Johan Hammond Rosbach pri «Impresoj pri Norda Italujo». Pere de multegaj kolorlumbildoj li kondukis nin tra la ĉarma norda parto de Italujo, inkl. Monako, kun sia trezoro de konstruaĵoj, pentraĵoj, skulptaĵoj, pejzaĵoj k. t. p. Kiel kutime Rosbach prezentis la prelegon en bonega esperantlingva stilo. La prezidanto dankis al Rosbach pro la aventurovojaĝo kaj petis lin transdoni al la Esperantoklubo en Sarpsborg *La Urso* niajn plej sincerajn salutojn.

La Teatra Grupo prezentis skeĉon «La ŝtelisto» kiun verkis kaj reĝisoris nia klubano Brynhild Østmo. Ludis Gerd Jæger Pettersen, C. Støp-Bowitz, Ellen Tangen kaj John Berggreen. Al la demando je la fino korekte respondis nia saĝa Otto Prytz.

La Urso, Sarpsborg,

regule kunvenas. Nova filmstrio estas aĉetita, kaj la traduka laboro komencita. Du filmstriaĵaj tekstoj estas nun pretaj, unu el ili jam magnetofone registrita.

En unu kunveno Rosbach montris 8-milimetran filmon pri la unua duono de sia vojaĝo al Italujo, en alia kunveno li montris kolorfotojn pri la malnova Romo kaj rakontis pri ĝi.

La Esperantoklubo de Bergen.

La nova prez. Elsa Njøten malfermis, kaj gvidis la kunvenon. Ŝi komence legis de Andre Bjerke «Pyramidene og Egyptianerne», kiel meti ŝtonojn post ŝtonoj, kaj ankoraŭfoje ŝtonojn, ĝis atingaj rezultoj. Laŭ figura senco al la klublaboro ankaŭ ni fine sukcesos. — Ŝi informis pri la planitaj printempkunvenoj, en kiuj la plej multaj membroj estos aktivigataj.

Ni multe kantis, kaj s.ino Thora Horntvedt plane ludis.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
C. E. Holters vei 7 C, Sarpsborg: - Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urgaj sendaĵoj.
Telefona: 54 7 27